PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G.PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R.DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves 54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 8 F. Abono: 31 F (TTC). Kotizo: 9 F. Sume: 40 F. ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

==== N° 164 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1990 ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++


## LE MOT DU PRESIDENT

Bientôt, les cloches sonneront pour annoncer joyeusement la résurrection du Christ, point central de notre foi et signe tangible de l' immense amour de Celui qui s' est livré pour nous sauver.

Tout à la joie pascale, nous ne manquerons pas de méditer le thème de notre prochain congrès qui, à la fin du mois d' avril, approfondira l' Amour que Dieu nous donne et celui que les hommes doivent lui témoigner en retour. Il serait bon que tous ceux qui ne pourront prendre part au congrès réfléchissent à ce problème qui conditionne toute notre vie de chrétiens.

Nous ne manquerons pas non plus d' aider de nos prières la préparation des exercices spirituels qui, en octobre prochain, réuniront à Rome des prêtres du monde entier. Ils y seront confrontés au problème des langues et, espérons-le, prendront conscience que depuis plus de cebt ans, l' Esperanto a fait ses preuves comme moyen de communication et que son usage généralisé résoudrait bien des difficultés.

A. B.

## BILETO DE LA PREZIDANTO

La sonoriloj baldaŭ tintos por ĝoje anonci la releviĝon de Kristo, centran punkton de nia kredo kaj palpebla signo de Tiu, kiu sin fordonis por nin savi.

Dum la paska ĝojo pleniĝos nin, ni meditu pri la kongresa temo, kiu, fine de aprilo, funde pritraktos la Amon donitan de Dio al ni kaj tiun, kiun la homoj ŝuldas al Li. Estus bone, ke tiuj, kiuj ne povos kongresi pripensu tiun problemon, kiu kondiĉas nian tutan kristanan vivon.

Ni ankaŭ preĝu por helpi al la preparado de la spiritaj ekzercoj, kiuj, en oktobro, kuniĝos en Romo pastrojn el la tuta mondo. Ili tie alfrontos la lingvan problemon. Ni esperu, ke ili konsciiĝos, ke, de pli ol cent jaroj, Esperanto pruvis sin taŭga interkomprenilo kaj ke ĝia ĝeneraliĝita uzo solvus multajn malfacilaĵojn.

## LAUDOJ

Ni me plu iru inverse
De Tiu, kiu kuntrenas nin:
La Sinjoro releviĝis!

Em Lia korpo subite alvenas
La eterneco.
Li redonas valoron
Al la tagoj, la semajnoj,
Envojigas ilin al la ĝojo.

Ni me plu iru sen fajro nek hejmo,
Kiam Jesuo akompanas nin;
La Sinjoro releviĝis!

Jem Li, pano sur la tablo
De la baptitoj,
Donaco de Dio
Ofertita al ĉiuj.

Hodiaŭ, ho Kristo, malfermu niajn okulojn.

Laŭ la diaj spuroj
Abatejo de Tamié

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## ĈU DA, ĈU DE ?

Omi uzas DA post vorto, kiu havas signifon de mezuro, kiu esprimas pli malpli difinitan kvanton, nombron, grandon, pezon, sed nur kiam la posta substantivo estas nepre nedifinita. La mezuro povas esti preciza aŭ proksimuma:

Liveru la necesan nombron DA brikoj.
Glaso DA vino.

La mezuro povas esti ankaŭ malpreciza kaj montri ĉu etan, ĉu egan kvanton:

Bukedo DA rozoj; sen ia ombro DA dubo
Multe DA tagoj; torentoj DA larmoj

Multaj vortoj povas ricevi signifon de mezuro. Por kontroli tion, oni metu antaŭ la duba vorto la demandon "Kiom multe?" Se la vorto respondas al tiu demando, oni uzu DA: Donu al mi pecon - pano. Kiom multe? pecon, do DA.

Omi povas ankaŭ uzi la formulon de Stojan:

- n DE N. estas - n
- n DA N. estas - N

Em la salonon eniris en du vico deko DA gvardistoj (eniris gvardistoj, me deko), poste du vicoj DE pastroj (eniris ne nur pastroj, sed vicoj).

Kiel jam indikite, la substantivo sekvanta DA devas esti nepre nedifinita. Antaŭ difinita substantivo, oni neniam uzu DA. Tio okazas antaŭ:

- artikolo: peco DA pano, sed peco DE la pano.
- ĉiu, ĉiuj, tuta: kelke DA soldatoj, sed nur kelkaj el ĉiuj soldatoj.
- montraj, personaj, posedaj kaj nombraj pronomoj aŭ adjektivoj: 600 F DA rento, sed rento DE 600 F.
  Dek jaroj DA vivo, sed dek jaroj DE sia vivo.
- substantivo difinita per si mem, se ĝi montras precizan kvanton. Tio okazas por ĉiuj nomoj de unuo (horo, tago, monato, metro, franko..), en la singularo (plurale ili esprimas me devige precize difinitan kvanton): parto DE jaro, sed parto DA tempo.
  Li kuris kelke DA metroj.
- frakcioj: duono DE paĝo, kvarono DE kuko.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NIA MEMBRARO

Nova membro 1990: P-ro MANASSERO (Var)    Plej fratan bonvenon al li!

Bonfarantoj: 1) S-ino GUILLOT (Oise); 2) S-ro SANSON (Essonne)    Dankegon!

## MATENA MEDITADO

Em la silento de tiu naskiĝanta tago,
Mi venas peti de Vi pacon, saĝon, forton.
Hodiaŭ mi volas rigardi la mondon
Per okuloj amoplenaj,
Esti pacienca, komprenema, milda kaj saĝa,
Vidi trans la ŝajno
Viajn infanojn, kiel Vi mem ilin vidas,
Kaj tiel en ĉiu nur bonon vidi.
Fermu miajn orelojn je ĉia kalumnio,
Nur la benantaj pensoj
Loĝu en mia spirito.
Mi estu tiel bonema kaj tiel ĝoja,
Ke ĉiuj, kiuj proksimiĝos al mi sentu
Viam ĉeeston.
Vestu min per Via beleco, Sinjoro,
Kaj laŭlonge de ĉi tiu tago mi revelaciu Vin.

WWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWW

## DIRAĴOJ EL CHIARA LUBICH (daŭrigo)

52. La pasinto? Konfidu ĝin al la dia korpardono. La estonto? Atendu, ke ĝi sin prezentu kaj vivu ĝin centprocente.
53. Relegu Magnificat, ĝi estas la unua kaj plej potenca paĝo de la socia manifesto de la kristanoj.
54. Jen la granda allogaĵo de la modernaj tempoj: supreniĝi ĝis la plej alta kontemplado restante meze de la aliaj. Homo inter la homoj.
55. Se vi volas la saĝecon, petu ĝin. Dio elaŭdos vin. Li tion promesis.
56. "Ne estas rozoj sen dornoj" estas melankolia proverbo. Ni prefere diru: "Ne estas dornoj sen rozoj".
57. La amo preferas devojiĝintan pekulon, kiu retrovis sian vojon ol cent justulojn imitemajn, kaj ĝi volonte pruntas al Dio sian fantazion por festi la malŝpareman filon.
58. For la moktimon! Vivu la respekto al Dio!
59. Ni ĝuu senskrupule la nunajn ĝojojn, ili plifortigos nin kaj preparas min al la venontaj afliktaĵoj.
60. Dio preferas vin neperfekta sed fidema kaj sentema al Lia amikeco ol senpeka sed tro memfida.
61. Ĉu vi estos la junulo, kiu konsolos Kriston pro Lia vana amika rigardo al la riĉa junulo?
62. La mondo apartenos al kiu amos ĝin pleje kaj scios doni al ĝi garantion pri tio.
63. Nur la ĉeso de l' sufero naskas la ardon de l' amo.
64. Ne retropaŝu pro la aŭdaco de iuj ideoj. Kun partnero, kiu venkis la morton, petu la neeblaĵon.
65. Kiam oni amas, ĉio kondukas al bono. (daŭrigota)

WWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWWW

## MALNOVA ANGLA LEGENDO ( daŭrigo)

- Via Moŝto," respondis la vilaĝanoj "estos farite laŭ via volo. Ni do ne mortigos tiun Danon, sed ne postulu, ke ni flegu lin: ni lin lasos morti sur ĉi tiu strando, kaj tio jam estas granda ofero, kiun nia kolero konsentas. - Pri tio mi vin ne petas" respondis milde la reĝino "sed almenaŭ helpu min por meti lin en tiun kabanon, kie mi restos preĝante, por ke la Estrego bonvolu kompeti lin." Oni do portis la vunditon sur folian liton, kiu estis ene; tremante, li rigardis al tiuj homoj, en kies povo li estis, kaj ĉiumomente ŝajnis al li, ke ili tuj mortigos lin. Sed, post kiam ĉiuj foriris, kiam restis nur la reĝino, kiu etendis al li trinkaĵon, li ne plu komprenis kaj per malfortega voĉo demandis, kial oni zorgas pri li.

Ja me mi, povra poeto, povus redoni ĉi tie la vortojn de la reĝino, ĉar sciu, ke en tiu momento, Dio mem direktis al ŝiaj lipoj ĉiujn vortojn, kiujn ŝi eldiris; ŝi instruis al tiu pagamo, pli bone ol farus la roma Papo, la tutan...

verom pri mia sankta religio, tiel ke finfine liaj okuloj pleniĝis je larmoj, li ploris kun bedaŭro pri ĉiuj pekoj faritaj dum lia vivo, kaj demandis, ĉu li iam estos pardonita. La reĝino respondis, ke, se li petos pri la graco de la bapto kun tiel pentanta koro, sendube Dio ne sendos siajn anĝelojn preni lian animon, sed Li mem venos akcepti ĝin.

Tiam, vidante, ke li baldaŭ forlasos ĉi tiun mondon, ŝi prenis akvon kaj Dia inspiro dirigis al ŝi:

Mi vin baptas, frato mia,
Savu vin la Dia amo;
Super ni, en Paradizo,
Estu sankta Neniamo.

( daŭrigota)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## NIA KONGRESTEMO: AMO DE DIO - AMO AL DIO

ENKONDUKO: Ni estas esperantistaj kristanoj, partoprenantoj en katolika movado. Kio devas esti nia praktika sinteno?

Dio ne estas unue juĝisto, sed Patro, kiu sendis sian propran Filon por savi la homojn. Do, ni devas per Esperanto konigi al la mondo tiun patran amon de Dio al la homaro, kaj la konsekvencan respondon de la homo al Dio.

DEMANDARO: 1. Kia estas Dio?
2. Kiuj estas la ĉefaj devoj de la homo?
3. Kio estas la amo?
4. Kiel Dio montris sian amon al ni, homoj, kaj al la tuta kreitaro?
5. Kiel ni povas montri nian amon al Dio?
6. Kial kaj kiel ni devas ami ĉiujn homojn?
7. Kial kaj kiel ni devas ami ĉiujn kreitaĵojn?
8. Kiel Esperanto povas helpi nin montri nian amon
   a) al Dio?
   b) al niaj fratoj?
   c) al la nekatolikoj?
9. Kiuj homoj montris plej manifeste sian amon al Dio, kaj kiel?
   Ekz: 1. S-ta Francisko el Asizo.
   2. S-ta Tomaso de Akvino.
   3. Patrino Tereza.
   4. Pastro Petro.

L. BOURDON

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## MEMBRARO I.K.U.E.

1. P-ro SCHNEIDER; 2. S-ro BLIN; 3. S-ro SAUTREUIL; 4. S-ro THIOLLIERE; 5. S-ro COLAS; 6. S-ro BESSIERE; 7. S-ino PETIT-BRICOUT; 8. F-to NIQUET; 9. F-ino CHATELUS; 10. S-ro JOSSINET; 11. S-ino CHEVERRY; 12. S-ro P. VERNIN; 13. S-ro L. VERNIN; 14. S-ro FARDET; 15. S-ro AMOUROUX; 16. F-ino GIUDICELLI; 17. S-ro MILLET; 18. S-ro SANSON; 19. S-ro GOURDON; 20. S-ro LECOCQ; 21. S-ino LLORENS; 22. S-ro DOYELLE; 23. P-ro GOUDE; 24. S-ino GILLES; 25. P-ro HEROUX; 26. S-ro COLARUOTOLO.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1989

| ENSPEZOJ | | ! | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|---|
| Kotizoj | 4 585,00 | ! | Bulteno | 3 626,52 |
| | | ! | Kovertoj | 569,28 |
| Donacoj | 1 727,20 | ! | Korespondado | 570,00 |
| | | ! | Vojaĝoj komitatanoj | 1 288,00 |
| Rentumo ŝparkaso | 450,64 | ! | Kongreso Nevers | 6 573,00 |
| | | ! | Sidejo U.F.E. | 200,00 |
| Kongreso Nevers | 6 710,00 | ! | Informiloj | 374,00 |
| | | ! | Diversaj | 172,00 |
| | 13 472,84 | ! | | 13 372,80 |

../...

| | | | |
|---|---|---|---|
| Pozitiva saldo | 100,04 | ĉe la ŝparkaso | 9 758,39 |
| En la kaso la 1/1/1989 | 13 997,99 | ĉe la p.ĉ.k. | 4 339,64 |
| En la kaso la 31/12/1989 | 14 098,03 | | 14 098,03 |

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA SKOLTA MOVADO KAJ LA MONDO

La homoj ne povas eniri sen preparo en la 3-an jarmilon. Ĉin omi serioze preparos aŭ oni maltrafos.

Du apartaj homoj sin metis je nia servo: Baden-Powel kaj Zamenhof. La unua proponis al la gejunuloj kompletan organizon, kiu akcelas la iniciatemon, la taĉmentan spiriton, la akordon aktivan kaj konstruan kun la ceteraj.

La dua kreis, forĝis kaj disvastigis en la mondon la nepre necesan rimedon de universala kompreno: Esperanto.

SKOLTA TENDARO INTERNACIA

Le Moulin de l' Hermeton en Bastière-Lavaux (Belgujo) de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1990. Sendu la aliĝilon kiel eble plej rapide al P-ro Bourdon 7, avenue Salomon 59800 LILLE.

Nomo: Persona nomo:

Adreso:

Telefono:

Naskiĝdato: Skolto ekde:

Respondeco: Grupo:

Subskribo:

Subskribo kaj adreso de la gepatroj: Dato:

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

GRAVA INFORMO

La 82-a nacia kongreso de E° okazos en la kastelo de BLOIS de la 1-a ĝis 5-a de junio 1990. P-ro Bourdon diservos dimanĉon 3-an de junio je la 18.00.

Informas: S-ro R. PONS 24, mail Pierre Charlot 41000 BLOIS.

Estus bone, ke kiel eble plej multaj el niaj anoj partoprenu tiun kongreson... kaj iĝu membroj de la landa asocio U.F.E.

*

La Centro E° de la Regiono Liona (C.E.R.L.) eldonis bildkarton "A l'ère spatiale, parlez l' E°". Prezo: 11 kartoj, 26 F; 22 kartoj, 48 F; 55 kartoj, 105 F; 110 kartoj, 175 F. mendu de C.E.R.L. 7, rue Major Martin 69001 LYON. P.ĉ.k. 2444 99 H LYON.

*

Por bone kanti dum la kongresaj diservoj, havigu al vi nian kantikaron. Prezo: 50 F (afrankite). Mendu de S-ino Vincent p.ĉ.k. A.C.F.E. 2324 93 N ROUEN.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LAU LA SPUROJ DE S-ta PAULO.

La feliĉaj pilgrimantoj de la XX-a jarcento disponas pli komfortajn vojaĝrimedojn ol la apostolo kaj facile povas sekvi, tra la mediteranea baseno, lian migradon, kiu celis la evangelizadon de la tiamaj "paganoj". Mi elektis la krozadon kaj enŝipiĝis en Nice la 17-an de novembro por dusemajna vojaĝo, kiu kondukis nin, ne nur fizike sed ankaŭ spirite al kelkaj lokoj, kie S-ta Paŭlo vivis, predikis en la 1-a jc. Niaj du prelegantoj alterne prezentis al ni la apostolon, lian mision, dum la ŝipego komforte portis nin sur la moviĝantaj ondoj unue al Tartous. De la haveno, la busoj kondukis la pilgrimantojn al Damas aŭ...

Palmyre. La morgaŭan tagon, ni atingis la Sanktan Teron, kie ni vizitis Jerusalemon kaj Betlehemon. Kelkaj preferis traveturi la dezerton kaj viziti Qumran. La postan tagon, eblis viziti Nazareton kaj Tiberiadon aŭ S-tan Johanon d'Acre. Nia ŝipo tiam pluveturis al Turkujo kaj ankris en la haveno Antalya por ebligi la viziton de Side, Perge kaj de la tre interesa muzeo en Antalya mem. La morgaŭan tagon, ni vizitis la grekajn insulojn Cos, kie oni renovigis la ĵuron de Hipokrato, kaj Patmos, kie S-ta Johano verkis sian Apokalipson. Tiuj insuloj tre proksimas al Turkujo, kie ni ree haltis la postan tagon en la haveno Kusadasi por viziti Efezon aŭ Milet. La nokta navigado kondukis nin ĝis Le Pirée, haveno de Ateno. Dum parto de la pilgrimantoj sin direktis al Akropolo, aliaj preferis Epidaure kaj Mycènes. Post nokta navigado tra la Korinta kanalo kaj plia tago da veturado, ni atingis Napolon, vizitis Romon aŭ Monton Kasinon. La krozado finiĝis en Ĝenovo la 30-an de novembro.

Dum tiu pilgrimado, la partoprenantaj pastroj kuncelebris diservon ĉiutage ĉu sur la ŝipo ĉu okaze de ekskurso. Ĉar ni estis pli ol 500, ekestis foje problemoj pri spaco, sed la organizantoj sukcesis ilin solvi plej kontentige.

Tiun formulon mi rekomendas al tiuj, kiuj bone elportas la marvojaĝojn.

J. VINCENT.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## KONGRESO EN BOURESSE

Bonvolu noti la jenajn modifojn:

Vendredon 27-an de aprilo posttagmeze: kantekzercado

Sabaton 28-an vespere: varietea vespero

Dimanĉon 29-an - 18.00: diservo
20.45: literatura vespero

Lundon 30-an - ~~xxxxxxxxxxxxx~~ 11.00: sintezo kaj konkludo
18.00: diservo
20.45: distra vespero

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## ĈIUFOJE, KIAM IU HOMO...

Ĉiufoje, kiam iu homo
tra la mondo
kriis al justeco,
justeco por sia frato,
apud li, ĉiufoje,
Sinjoro, vi staras.

Ĉiufoje, kiam iu homo
tra la mondo
portis la angoron,
angoron de sia frato,
apud li, ĉiufoje,
Sinjoro, vi staras.

Ĉiufoje, kiam iu homo
tra la mondo
rompis la premĉenojn,
premĉenojn de sia frato,
apud li, ĉiufoje,
Sinjoro, vi staras.

Ĉiufoje, kiam iu homo
tra la mondo
donis la memvivon,
memvivon por sia frato,
apud li, ĉiufoje,
Sinjoro, vi staras.

Jean SERVEL - elfrancigis Roger DEGRELLE

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## FARU NIN DIGNAJ JE SERVO

Igu nin dignaj,
Sinjoro,
Je servo de niaj kunhomoj,
Kiuj tra la mondo
Kaj vivas
Kaj mortas
Malriĉaj
Malsataj.

Donu al ĉiuj
Hodiaŭ
Per faro de niaj kunmanoj,
Panon ĉiutagan
Kaj vivon
Kaj pacon
Per amo
Kornia.

Patrino TEREZA - elfrancigis Roger DEGRELLE

## ANGULO DE LA KASISTINO

Oni kutime diras, ke ripetado estas la ŝlosilo de la instruado. Verŝajne, mi me sufiĉe ripetis, ĉar multaj el niaj anoj ankoraù ne scias, ke kotizon oni nepre pagu komence de januaro, eĉ prefere fine de decembro.

Bonvolu kontroli viajn membrokartojn n-oj:

24-29-46-51-56-72-74-78-87-88-96-101-103-115-118-122-126-128-132-135-136-142-147-149-154-171-177-181-195-211-220-224-235-238-239-242-244-247-249-252-255-256-265-267-268-270-277-282-285-288-289-290.

TUJ (morgaù vi jam forgesos!) sendu ĉekon al Association Catholique Française pour l' E° p.ĉ.k. ROUEN 2324 93 N.

La bulteno multekostas, kaj ne eblas sendi ĝin senpage.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

INSTRUKCIOJ POR LA VOĈDONADO: respondu la ĉi subajn demandojn 1; kaj 2. Enmetu la voĉdonilon (eventuale ankaù la rajtigilon) en koverton sen indiko. Enŝovu ĉi tiun koverton en alian, kiun vi sendu al la sekretariino, F-ino PREUX, antaù la 15-a de aprilo. Dorse de tiu dua koverto, skribu vian nomon. Ne sendu ion plian, ĉar tiun koverton oni malfermos nur en Bouresse, dum la kongreso!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## RAJTIGILO

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo)

me povas partopreni la kongreson en Bouresse kaj rajtigas

reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de F.K.E.A.

Antaù la subskribo, skribu                    Dato kaj subskribo:

mane "Bon pour pouvoir"

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## VOĈDONILO

1. Ĉu vi aprobas la laboron faritan de FKEA?    JES    NE    SINDETENO (1)
2. Ĉu vi aprobas la financan raporton?    JES    NE    SINDETENO (1)
3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 6 kandidatoj por 4 postenoj. (2)

S-ro BARON Dominique    S-ro BLOT Louis    P-ro HEROUX André

S-ro LAFARGUE Henri    F-ino PREUX Georgette    S-ino VINCENT Jeannine

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

(2) Vi nepre devas forstreki du (2) nomojn por ke via bulteno validu.

N.B. Ĉu vi atente legis la instrukciojn por la voĉdonado?

Nur tiuj, kiuj pagis sian kotizon por 1990 rajtas voĉdoni.

ENHAVO

1. Le mot du président
2. Laŭdoj
Ĉu da, ĉu de?
3. Matena meditado
Diraĵoj el Chira Lubich
Malnova angla legendo
4. Nia kongrestemo
Financa raporto
5. La skolta movado
Informoj
Laŭ la spuroj de S-ta Paŭlo
6. Kongreso en Bouresse
Ĉiufoje, kiam iu homo
Faru nin dignaj je servo
7. Angulo de la kasistino
Rajtigilo kaj voĉdonilo

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## KOTIZTABELO 1990

| | |
|---|---|
| I.K.U.E. kun "Espero Katolika" | 130 F |
| Peranto: S-ro R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L. | |

------------

| | |
|---|---|
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo | 40 F |
| Geedza paro | 50 F |
| Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 20 F |
| Bonfaranto | 200 F |
| Dumviva membro | 800 F |

------------

| | |
|---|---|
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" | 230 F |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 225 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Dépôt légal: 1er trimestre 1990 !! Polycopié par l' A.C.F.E.
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! Prieuré St-Martin
Directeur: René-Claude Colas !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
Directeur-délégué: !! FRANCE
René-Jean Marmou

René LLECH-WALTER
72, Avenue Général de Gaulle, 72
66000 PERPIGNAN
Tél. 68.34.22.18 et 68.34.54.38
C.C.P 160.60 C Montpellier